



# TEA-BULTENO

7<sup>A</sup> JARO

SEPTEMBRO - OKTOBRO 2004

NUMEROJ 9-10



## Vagade tra Ĉina Esperantujo 18<sup>a</sup> de julio-14<sup>a</sup> de aŭgusto

Rakontas Elda Doerfler

- *Kiom da valizoj mi kunportu?*
- *Nu, vi restados en Ĉinio 4 semajnojn, ne vian tutan ceteran vivon, ĉu ne? Aŭ via sekreta intenco estas ne plu reveni Italien? - Demandsigne gapis la edzo, tamen... kaŝe frotante al si la manojn pro tiu ŝanco havi antaŭ si longedaŭran vivperiodon pli trankvilan kaj senlaboran.*
- *Ho ne, mia karulo, certe mi revenos, sed la problemo estas, ke tute certe tie estos tiom da aĉetindaĵoj, tiom da belaĵoj absolute akirendaj, ke mi bezonos ne unu, sed almenaŭ du valizojn. Kaj plie, vi atentu, okazos la UK kaj dum UK okazos aŭkcio, kaj tre probable multegos la brokantaĵoj mirindaj, antikvegaj, absolute konkerindaj. Kaj fine, nun ke realiĝas mia pli ol dudekjara revo viziti Ĉinion, ĉu vi pensas ke mi restos indiferenta antaŭ tieaj allogaĵoj? Tute ne, rezisto al tiaj tentoj ne estas mia precipa eco kaj certe facile mi cedos al senbrida aĉetemo.*

En la okuloj de mia edzo klare videblis ektimo pri familia bankroto, tiel ke fine estis interkonsentita ia kompromiso: nur unu granda valizo sur kies fundo - ruze kaŝita - mi provizis mansakon, el perfekta grando por enteni sufiĉan kvanton da materialo.

Mi estas preta, ĝis la revido al ĉiuj! Ne timu, mi ne perdiĝos! Mi jam flugas: jen, Ĉinio, jen mi estas alvenanta! Sub mi etendiĝas, kvazaŭ mirakla miraĝo, la vasta ĉinia horizonto: maro, ĉielo, riveroj, tero kunfandiĝas, vualitaj per ruĝetkolora nubetaro. Preskaŭ mi ne povas kredi, sed ĉio ĉirkaŭa certigas min, ke vere temas pri Ĉinio, kaj pli precize pri nia unua celo, nome *Shanghai*. Eĉ la sufiĉe daŭra atendo en longa vico ĉe la flughavenaj giĉetoj pro burokrataĵoj ne tiom ĝenis: kio fakte signifas duonan horon tie perditan, kiam antaŭ mi staras 28 tagoj da vagado enlanda? Ĉio facile elteneblis! Malpli facile estis elteni, tuj post eliro el freŝe klimatizita flughaveno, la 37-gradan temperaturon kaj 90-procentan aermalsekecon, kiuj iom ŝokis la du ĵus alvenintajn triestanojn. (Ha, mi forgesis diri, ke tien mi ne iris sola, sed kun Edvige, jam kutima kunvojaĝantino.)

Taksie al hotelo, por tie renkonti la esperantistan grupon partoprenontan en la antaŭkongresa ekskurso. Ĝis nun ĉio glate funkcias - alloga programo atendas nin: vizito de *Guilin* kaj krozado sur Li-rivero, vizito de *Xi'an* kaj la fama terakota armeo, por fine ĉiuj kune flugi al *Beijing* (Pekino) por la 89<sup>a</sup> UK.

Jes, bela programo, iel hejme antaŭguita, kiam mi legis

kaj relegis pri la vizitindaĵoj, kaj jam tiam, antaŭ miaj fermitaj okuloj, sinsekvadis, kvazaŭ filmprojekciaĵoj, la panoramoj kaj pejzaĝoj viditaj tamen nur en la turismaj gvidlibroj. Kaj nun ili aperas reale antaŭ miaj malfermitaj okuloj: ĉio ja superis ĉion imagitan! Ne eblas ĉi tion priskribi, tial jam nun mi varme invitas vin spekti la prezentadon de diapositivaj kaj filmoj, kiujn ni proponos en la venontaj monatoj.

Ĉio estis grandioza, vasta, senlima, giganta. *Shanghai*, ne urbo, iu fantasta kunmetaĵo de ŝtalaj turegoj kaj vitraj nubskrapuloj, dekoj da supervojoj interkruciĝantaj je nekredeblaj altecoj - subite, neatendite, jen mallarĝaj, mallumaj vojetoj kie homoj kuiras surstrate, elmetas siajn varojn en etaj budoj kie eĉ stari malfacilas, por denove, malantaŭ la angulo, malkovri strategojn kie brilaj festlumegoj multkoloraj invitas vin al luksa restoracio, al teatra spektaklo, al butikumado. Viglas la vivo, dumtage kaj dumnokte, freneze kaj verve laboras kaj umas la homoj, kiel formikoj en sia formikejo. Kaj ni ne parolu pri trafiko!

Kaj kion diri pri *Guilin*, la perlo de Ĉinio? Ĉi tie vi plonĝas en iun eksterordinaran natur-spektaklon, unikan en la tuta mondo, inspirantan famajn ĉinajn poetojn kaj pentristojn. "Sukerpanoj" el kalka ŝtono leviĝas el la akvoj de rivero Li, el senfinaj rizejoj, kaj sorĉe kaptas vian koron kaj postlasas nedireblajn kaj neforgeseblajn emociojn.

Se en *Guilin* dia fingro ĝin karesis por igi ĝin tiel mirindan, en *Xi'an* oni havas kroman pruvon, kiom superpova estas la ambicio de ordonanto kaj kiom altarta la kreemo de plenumantoj. Preskaŭ ĉiuj ja konas la plej famajn bildojn de la terakota armeo, sed vidi ĝin en sia kompleteco kaj ĝuste en la loko kie en la jaro 221<sup>a</sup> a.K. la unua imperiestro de unuigita Ĉinio *Qin Shihuang Di* ĝin ekkonstruigis, estas afero kiu lasas vin senspira kaj senvorta. Legendo, onidiroj, troigitaj supozoj, historiaj priskriboj rakontas pri giganta verko, pri urbo subtera ampleksanta 50 km<sup>2</sup>-ojn, pri riveroj el hidrargo, pri pli ol 700 mil laboristoj, metilaboristoj kaj artistoj, kiuj laboris dum 36 jaroj ... Kaj ankoraŭ multo kaŝiĝas subtere!

Nu, tiu ĉi unua ekgustumo de kulturo, naturo kaj kutimoj tute fremdaj al mi estis unuvorte mirinda! Ĉi unua parto de vojaĝo tamen estis eksterordinara, ĉar ne nur mi mertiĝis en la tiel longatempore revatan ĉinan mondon, sed ankaŭ en tiun esperantan! La kunvojaĝanta grupo konsistis el ĉirkaŭ 100 esperantistoj venintaj el 14 diversaj landoj, kiuj ekde ... tuj sukcesis bone kaj harmonie interrilati. Krome niaj ĉinaj gvidantoj-interpretantoj estis tiel ĉarmaj, tiel simpatiaj, tiel viglaj kaj amikiĝemaj, ke daŭre ni ĉiuj estis en akordo difini tiun antaŭkongresan ekskurson kvazaŭ perfekta.

Malgraŭ la ekstera tropika kaj malekster nordpolusa

temperaturoj, eĉ sub infere rostiga sunradiado, malgraŭ daŭra ŝvit-gutetado, ni ĉiuj estis gajaj, ridetantaj, feliĉaj pri niaj spertoj, eĉ en la momentoj iom krizetaj, sed ankaŭ tiam tiuj fariĝis kialo por ŝercado: ĉion oni enmetis en la sakon de memorindaj travivaĵoj, travivaĵoj kiujn oni devas alfronti kaj sendiskute akcepti, kiam oni vizitas fremdan landon. Fakte oni ne povas pretendi tie vivi kiel proprahejme kaj por serene ĝui la diferencojn specifajn de aliaj kulturoj kaj kutimoj, preferindas malferme bonvenigi ties kontrastojn, kiuj certe helpas en pli bona kompreno de la gastiganta popolo.

Kaj nun, dankon al niaj ĉinaj akompanantoj, s-ro Wang el *Shanghai* kaj s-ino Wang Xue el *Suzhou*, kiuj pacience, lerte kaj kuraĝe, sukcesis gvidi, senprobleme kaj senakcidente, centon da personoj tra la vidindaĵoj de tiu parto de Ĉinio. Dank' al ili ni pli funde ekkonis la ĉinan plurmiljaran historion. Dank' al s-ino Xue, neniu el ni perdis sian monujon, sian pasporton, sian flugbileton, pro ŝia konstanta atentigo: "Bone zorgu pri viaj varolaroj"! Tia vortumado eniris ĉies elparoladon, ĉar tiel ĉarme ŝi misprononcis la vorton "valorajojn", ke ĝi ĝenerale estis adoptita kiel nova termino.

Vendredon la 18<sup>an</sup> de julio, horo 18<sup>a</sup> - enhoteliĝo en Pekino! Ni estas iom lacaj, ĉar matene vizitado de urbo *Xi'an*, vizito de Jad-muzeo, abunda tagmanĝo, ekflugo je la 15<sup>a</sup> horo, do, nenio alia restis al tiuj du kompatindaj turistinoj, ol iom manĝi por poste tuj enlitiĝi. Sekvan tagon, al kongresejo por komitatkunsido! "*Jes, ni voku taksion, ĉar ne estas tempo por tien iri piede, tiom pli ke entute ni ne scias kie reale ni troviĝas.*" "*En la dua UK-bulteno mi legis ke la distanco inter nia hotelo kaj kongresejo egalas al 15-minuta promonado. Do, eventuale revene, ĉu ne?*" Interkonsentite! Taksiisto ŝoforas ĉirkaŭ 20 minutojn, laŭ stratoj trafikoplenaj, kie aŭtobusoj, bicikloj, aŭtomobiloj, kamionoj, piedirantoj intermiksiĝas haose: ŝajne la brems-pedalo estas tute ne konata ilo por kelkaj stirantoj. Nu, ni atingas nian celon, pagas 12 juanojn (1,20 €) kaj pensas: "*Boh, eble la taksiisto, pro nia fremdeco kaj kiel bonvenigo, deziris regali nin per longa veturado, por ke ni admiru la laŭvojan pejzaĝon, kaj ĉefe la centojn da belaj ruĝaj standardoj, reklamantaj nian UK-on.*" Nu, mi ne plue ĝenos vin per kromaj detaloj, sed rezulto estis, ke neniam ni piediris al kongresejo, ĉar la distanco inter hotelo kaj kongresejo estis ĉirkaŭ 10-kilometra. Ĉu ĉina mezursistemo estas iom diferenca de la nia?

Eniro en kongresejo, belaj gejunuloj nin atendas, petas kongres-karton, sidigas sur fotelo, fotas, algluas la rezulton sur la kongres-ŝildon, plastigas, pendigas ĝin al la kolo kaj akompanas al la akceptaj giĉetoj: ĉio ĉi ene de 4 minutoj kaj 34 sekundoj! Fantaste!

Ekde de nun komenciĝas la kongresa karuselo: pri ĝi jen kelkaj eroj.

Kutime kiam mi partoprenas UK-on, mia ĉefa aktivado estas, tuttage, ĉeesti kiel eble plej da prelegoj, kunvenoj, muzikaj kaj teatraj programoj k.s., kaj je la fino rezervi kelkajn tagojn por vizito de la gastiganta urbo. Sed ĉi-foje turismemo superis klerigejon kaj en Pekino mia ĉiutaga "devo" estis unue enaŭtobusiĝi por vizito de tiu aŭ alia vidindaĵo, kune kun multaj aliaj esperantistoj havantaj mian saman deziron. Do, ankaŭ tio pozitive efikis, ĉar multe mi praktikis la lingvon kaj multajn novajn

amikojn akiris: ĉu ne ankaŭ tio estas nia celo?

★ ★ ★ ★ ★ ★

### Kaj nun iom pri la 89<sup>a</sup> UK—Pekino 2004

Laŭtradicie, aperis entute 8 numeroj de la Kongresa Kuriero, kiu, maltradicie, ne estis nomita "Kongresa Kuriero", sed "Via ĉiutaga ĵurnaleto", krome ĉiutage ĝi ricevis alian titolon: Nova Sento, Forta Voko, Facila Vento, Homa Familio, Laboro Paca, Sankta Harmonio, Bela Songo, Eterna Beno. Nu, la plej signifaj vortoj el nia Himno "La Espero". En ĝi oni legis ampleksajn raportojn pri la diversaj okazintaĵoj, aŭ prezentadon de la ontaj programoj, aperis interesaj fotoj, ktp ktp. Profesinivela, plaĉaspekta informilo, redaktita de Wen Jingen kaj ties skipo: gratulojn al ili!

#### Nove elektita Estraro

Jen la nova estraro de UEA, kiu laboros ĝis la UK de la jaro 2007:

**Renato Corsetti** (Italio), prezidanto  
planado, eksteraj rilatoj, informado

**Claude Nourmont** (Luksemburgio), vicprezidanto  
kulturo, kongresoj

**Ulla Luin** (Svedio), ĝenerala sekretario

**Ans Bakker ten Hagen** (Nederlando)

financoj, administrado, TEJO

**Yu Tao** (Ĉinio)

Azia agado, amikoj de Esperanto

**Maritza Gutierrez Gonzales** (Kubo)

landa agado

**Amri Wandel** (Israelo)

faka kaj scienca agado

Notindas, ke la plejmulto el la estraranoj estas virinoj, ke unufoje iĝis estrarano ĉino, ke kvar el ili neniam antaŭe estis UEA-estrarano. Gratulojn al la novelektitoj kaj bonan kaj harmonian laboradon al ĉiuj!

#### Honoraj Membroj elektitaj

La komitato de UEA en sia unua kunsido decidis honori kelkajn esperantistojn per la titolo de Honora Membro aŭ membro de la Honora Patrona Komitato.

Kiel membro de la honora patrona komitato estis elektita la eksprezidanto de UEA, **Kep Enderby**, iama ministro pri justico en Aŭstralio.

Honoraj Membroj iĝis la elstara ĉina esperantisto **Li Shijun (Laŭlum)**, la rusia aktivulo **Vladimir Samodaj**, la iama konstanta kongresa sekretario de UEA **Gian Carlo Fighiera** (Italio), la unua prezidanto de KAEM (Komisiono pri Azia Esperanto-movado de UEA) **Ta-keuti Josikazu** (Japanio), la eksprezidanto de UEA **Lee Chong Yeong** (Koreio), la pedagogo **Maria Saturova-Seppova** (Slovakio) kaj la blindula aktivulo **Jiri Vycho-dil** (Ĉeĥio).

### Pekina Deklaro

La 89<sup>a</sup> Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en Pekino, Ĉinio, de la 24<sup>a</sup> ĝis la 31<sup>a</sup> de julio 2004 kun 2031 partoprenantoj el 51 landoj,

**traktinte** la temon "Lingva egaleco en internaciaj rilatoj",

**notante**, ke la jaro 2004 markas 50 jarojn da oficialaj rilatoj inter UEA kaj UNESKO,

**memorante**, ke rezolucioj de UNESKO notis la rezultojn atingitajn per Esperanto sur la kampo de internaciaj intelektaj intersanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de

la mondo kaj rekonis, ke tiuj rezultoj respondas al la celoj kaj idealoj de UNESKO,

**notante** la “Raporton pri Homa Evoluigo 2004” de la Evoluiga Programo de Unuiĝintaj Nacioj, kiu asertas, ke la libereco de esprimado kaj la uzado de lingvo estas nedisigeblaj,

**alte taksante** la agadon de la ĉina registaro, kiu, cele al pli justa kaj diverseca aliro al internacia interkompreniĝo, subtenas la instruadon kaj utiligon de Esperanto, konforme al la spirito de la rezolucio de UNESKO,

#### DEKLARAS

**ke** demokratia kaj egalrajta komunikado en internaciaj rilatoj estas esenca por internacia interkompreno kaj pacokunlaboro surbaze de egalaj lingvaj rilatoj,

**ke** estas bezonata nova internacia lingva ordo, kiu garantu egalecon, diversecon kaj demokration en lingvaj aferoj kaj efikan komunikadon inter nacioj kaj aliaj homgrupoj lingve malsamaj, ĉar en la nuna monda lingva situacio, kun kreskanta superrego de iuj lingvoj super aliaj, ne eblas realigi tiujn principojn,

**ke** neŭtrala komuna lingvo estu kerna elemento en tiu ordo, por atingi unuecon en diverseco inter la diversaj lingvoj kaj kulturoj je internacia nivelo,

**ke** sekve la internacia lingvo Esperanto, pruvinte dum pli ol cent jaroj siajn utilecon kaj praktikecon, meritas seriozan konsideron fare de internaciaj organizoj, ties membro-ŝtatoj kaj ĉiuj personoj kaj organizaĵoj de bona volo, kiuj respektas kaj deziras pacon kaj pacan kompreniĝon en egaleca etoso en nia hodiaŭa mondo,

**ke** por krei novan internacian lingvan ordon, kiu kontribuos al internacia kompreno kaj mondpaco, necesas forte subteni la enkondukadon de Esperanto en lernejojn, konforme al la spirito de la UNESKO-rezolucioj, ĉar tio faciligas lingvolernadon ĝenerale kaj antaŭenigas internaciecan aliron al la mondo.

### *Mallonge pri...*

**Kunveno de ELF-AREK** Vendredon la 30<sup>an</sup> de aŭgusto pli ol dek filatelistoj, plejparte ĉinaj, arigis por preparoli la funkciadon kaj celojn de sia asocio, interŝanĝi stampojn kaj diversajn esperantaĵojn. Ĝojon kaj miron la kolektemuloj esprimis pro la apero de porokazaj poŝtmarko kaj stampo. ĈINA FILATELA KOMPANIO kunlabore kun ĈINA ESPERANTO-LIGO emisiis 800 kompletojn da poŝtmarkoj. En la kompleto troviĝas folio el 16 poŝtmarkoj, kun unuopa valoro de 0,80 juano, ĉiun el ili apudas talono. Entute estas 4 diversaj talonoj: unu kun bildo de Zamenhof, alia kun bildo de la poŝtmarko eldonita en la jaro 1987, la tria kun tiu de la surprisita poŝtmarko de UK 1986 kaj la kvara, bildo de la emblemo de ĉijara kongreso. En tiu kompleto estis ankaŭ memorfolio. Ĉiuj korespondaĵoj senditaj el kongresejo ricevis ruĝinkan, rondan stampon, kun surskribaĵo jena: La 89<sup>a</sup> Universala Kongreso de Esperanto—2004.7.24-31. Plie estis eldonitaj 2 tutaĵoj kun bildaro de Pekino je valoro de 4,20 juanoj por sendo eksterlanda plus unu koverto kun bildo de la Ĉiela Altaro kaj skribaĵo pri la UK kaj surgluita poŝtmarko, de 0,80-juana valoro, por sendo enlanda.

**Rondo Kato** kunigis 26 katemajn geesperantistojn, kiuj diskutis pri la temo “Kial ni ŝatas katojn?”. Post vigla interparolo kaj pluraj anekdotoj, oni konkludis: “Katoj

allogas nin, ĉar ili estas sendependemaj, sentemaj, miŝteraj, majestaj, ruzaj, puriĝemaj kaj senimpostaj”. Gvidis la kunsidon Francisco L. Veuthey, redaktoro de la Katfolio.

**Arbareto “Esperanto-Bosko” naskiĝis en Chaoyang-Parko** Inaŭguro de ŝtono kiel porĉiama memorigaĵo de la 89<sup>a</sup> UK okazis mardon la 17<sup>an</sup> de julio, ĉeeste de s-ino Tan Xiuzhu, estrino de Ĉina E-Ligo, reprezentantoj de ĉinaj registaraj organizoj kaj cent esperantistoj el 51 landoj. La ŝtono surhavas la vorton “Esperanto-Bosko” en la internacia kaj ĉina lingvoj sur la antaŭa flanko, kaj dorse mallongan tekston pri historio de Esperanto. Okazis diversaj paroladoj, dum kiuj oni emfazis la valoron de nia lingvo kaj aŭspiciis ties daŭrajn evoluojn kaj prosperon.

**La plej vizitita kunveno** estis tiu de IKEF—Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo, dum kiu rekorda nombro da membroj, interesiĝantoj, scivolemuloj kaj entuziasmaj komercemuloj aŭskultis kaj pridiskutis interesan prelegon de Wang Tianyi pri “Praktiko kaj problemoj en la esperantista komerco”. En Aziaj landoj viglas kaj klopodas trovi siajn vojojn al efektiva aktivado en la komerca kampo pere de Esperanto multegaj komercistoj: laŭ la raportoj eĉ kun kontentiga rikoltado!

★ ★ ★ ★ ★ ★

Kiel kutime, dum la UK, krom la publikaj programoj kaj kunvenoj, okazis ankaŭ la “privataj” kunsidoj, nome formiĝis tute spontane tiuj “amikaj rondoj”, kadre de kiuj diverslandanoj interkonatiĝis kaj interamikiĝis. Kaj da tiaj multe videblis disaj tra la kongresejo! Ĉarmegis la grupoj de ĉinaj gejunuloj venintaj el plej diversaj provincoj, kiuj rideteme kaj simpatie aliris la eksterlandanojn, sin prezentis, petis komunan fotadon kaj klopodis interparoli, ĉiam antaŭdirante la bone konatan frazon, kiun tutcerte ĉiu el ni iam uzadis: “Bonvolu pardoni min, mi estas komencanto...”. Sed tio plej ofte ne veris, temis nur pri timo erari, pri timo nekompreni aŭ ne kapabli komprenigi sin; fine evidentiĝis ke ili bezonis nuran kuraĝigon.

Oftis renkontiĝoj kun malnovaj amikoj aŭ kun plumamikoj, kiuj neniam ajn antaŭe persone interkonatiĝis. Post 14 jaroj, finfine mi revidis ĉinan amikon ekkonintan unuafoje en Havano, dum la tiea UK en 1990. Dum ĉi tiuj jaroj, daŭre kaj senhalte, ni korespondadis, pli bone konis unu la alian perletere kaj retmesaĝe, plifirmiĝis nia amikeco. Ni ambaŭ sopiris pri denova intervidiĝo kaj finfine nia revo realiĝis! Ŝajnis ke ni estis malproksimaj unu de la alia, ne de antaŭ 14 jaroj, sed nur de antaŭ kelkaj semajnoj! Ho, mia kara amiko Nan Hai Zhang! Kiel danki vin pro via sincera, sindonema amikeco? Kiel trovi la ĝustajn vortojn? Dank’ al vi, mia posta vojaĝado tra Ĉinio estis tiel enhavoriĉa, tiel entuziasmiga, tiel instruoplena, tiel fabele mirinda!

Mia kara plumamikino Huang Guozhen! Kiam mi pensas al vi, mia koro pleniĝas je dolĉaj amsentoj, en ĝi vi kaj via edzo jam okupas tute apartan lokon. Mi ne memoras precize, kiam ni ekkorespondis pri Esperanta filatelo, sed tio ne gravas, renkontiĝi kun vi unuafoje estis tre atendata momento ankaŭ pro tiu nia komuna ŝatokupo. Strange! Malhelpoj prokrastis nian unuan rendevuon kongreseje, sed kiam finfine ni trovis unu la alian, ho, kia feliĉa kaj emociiga momento! Nura bedaŭrindaĵo estis ke, ĉu pro troa ekscitiĝo, ĉu pro mia

kulpo (eble mi tro rapide parolis, eble tro malsimple, eble per ne komprenebla prononcmalmaniero—mi pardonpetas pro ĉio ci!) vi ne kuraĝis alparoli min (dum mi scias, kiom kapabla vi estas, kaj pri tio atestas viaj bele skribitaj leteroj!). Sed ankaŭ tio ne gravas: ni daŭrigos nian korespondadon, kaj se iam estonte mi revenos al Ĉinio, mi certas ke tiam finfine ni diros unu al la alia ĉion kion ni ne sukcesis ĉifoje!

Kaj kion pri novaj geamikoj? Kun multaj mi konatiĝis, kaj kun multaj ekestis aparta, pli strikta, interamikigo. Neniun el ili eblos forgesi, kaj tiom pli neforgeseblaj estos la interparoladoj kaj opini-interŝanĝoj, pro ties speciala interesa kaj sentoplena enhavo. Dankon kaj ĝis la revido al vi ĉiuj: Liu Yue, Zhuang Qixiong, Ling Bo, Wu Lin, Bao Lin kaj multaj aliaj... Jen, la riĉaĵoj kiujn donacas al ni Esperanto!

★ ★ ★ ★ ★

**Konklude:** rilate al organizado, ĉijara kongreso estis aparte impresa pro la ricevinta atento fare de la ĉinaj aŭtoritatoj, kiuj ne nur pasive trovis lokon en la listo de la Honora Komitato, sed aktive ĉeestis la inaŭgurojn kaj de la impona ekspozicio KONU ĈINION, VIZITU BELAN PEKINON kaj de la kongreso mem. Bona laboro estis farita ankaŭ en la informada kampo, dank' al ampleksa retejo, kiu raportis ĉinlingve, tiel ke la lokaj amaskomunikiloj estis akurate ĝisdatitaj pri la diversaj kongreseroj. Kiom da partoprenantoj? Entute 2031 el 51 landoj, kies duono estis ĉinoj: do, mirinda tut-ĉina etoso, speciale ĝuita de la eksterlandanoj, kiuj havis eblon pliprofundigi siajn sciojn pri kulturo, kutimoj, historio kaj ĉiuj formoj de arto de ĉi tiu tute speciala Lando!

Mia eta raporto pri UK finiĝas per bela poeziaĵo aperinta en la 3<sup>a</sup> numero de "Via Ĉiutaga Ĵurnaleto", FACILA VENTO, verkita de Li Changlu.

## Omaĝe al la 89<sup>a</sup> UK

La mirinda kaj pompanta UK  
Estas la kongreso sen traduko.  
Parolante lingvon unu-nuran  
Oni aŭdas voĉon la plezurano.  
Inter ni foriĝas naci-limo,  
Ĉe ni restas amo kaj estimo.  
Kongresanoj sub ĉielo suna,  
Banas sin ĉiu en fest' komuna.

Venas vi de l'hejmo en Azio,  
Kaj mi fore el Oceanio,  
Kaj li malproksime de Eŭropo,  
Flugas de Afrik' ŝi kun galopo.  
Batas eĉ en Amerik' la koro  
De esperantistoj kun fervoro.  
Kolektiĝas ni el tuta mondo  
Cele al la amikeca fondo.

Ni esprimas sentojn en babil',  
Vi ne krokodilo kun voĉtril'.  
Vi ne timu pro balbuta buŝo,  
Ĉiu ja lernis kun vortfuŝo.  
UK-o rolas kiel famil'!  
Granda, fratoj estas ĉiuj ni.  
Dancu, ankaŭ kantu ni ridante,  
Firmas amikeco ja konstante.

La espera lingvo—Esperanto  
Pluen marŝu jen sub l' Ĉina Banto\*.  
Novan senton ligas l' antikvuj',  
Urĝas ege puls' de l' koro tuj.  
Firmamente brilas Verda Stelo,  
Glitas mare l' esperplena velo...  
Dissemiĝas ĉien la esper',  
Kreskos pompe verda la afer'.

\*Ruĝa korforma plektajo simbolanta bon-  
aŭguron

## Kaj nun ni daŭrigu la vojaĝon!

Post la kongreso, mi restis en Pekino ankoraŭ du tagojn, por viziti kromajn vidindaĵojn de tiu kolosa urbo: Pekino, la Norda Ĉefurbo, la granda imperiestra urbo, kie pasinteco postlasis profundajn spurojn. Nuntempe ĝi majeste imponas ne nur per siaj admirindaj palacoj kaj temploj kun tiuj karakterizaj tegmentoj, kies kvar anguloj elegante kaj svelte levigas al la ĉielo; aŭ per la romantikaj ĝardenoj, kie ripozi en ombro de koridoroj laŭantaj freŝo-donajn kanalojn, tie serĉante ŝirmadon kontraŭ la fajra sunradiado somera, sed ankaŭ per tiu betona densejo da nubskrapuloj kaj da popolaj konstruajaroj sen propra identeco kaj da komercaj centregoj, kiuj abrupte elkreskas, kiel fungoj en arbaro post pluvo.

Por doni ioman ideon pri ties grandeco, jen kelkaj ciferoj: Pekino vastas 1700 kvadratajn km-ojn kaj havas 20 milionojn da enloĝantoj! Kaj en tiu ĝangalo da interkruciĝantaj, nekredible trafikitaj stratoj kaj superstratoj, da kvartaloj modernaj kaj supermodernaj, vi perdas komplete la orientiĝon kaj, veturante per taksio (ho, kia grandmerita invento! Plie mi defias iun ajn viziti tian urbon piedirante!), jen, subite, vi laŭiras la famajn "hutong"-ojn, ĝuste tie, tie malantaŭ la angulo de komerca, usoneska, Centro, kie homoj ĉe l' hejma pordo ludas maĝangon, infanoj kuras kaj krietas, metiistoj vendas siajn varojn surstrate: jen finfine vi sentas ke ĝuste tiun aeron, tiun etoson vi deziras enspiri! Malnovo miksiĝas kun novo, sed mi certas (kaj varme esperas), ke la tradicioj de plurmiljara pasinteco ne tiel facile malaperos, ili ja nature nestas en la DNA de ĉiuj ĉinoj, por ke tiu orienta lando ne perdu sian specifan karakteron, sian fascinan misteron, sian karakterizan trajton, kiuj ekde ĉiam altiris kaj allogis la okcidentan mondon.

Senaverte tamen tempo pasas, kaj jam venas la momento forlasi *Beijing*-on kaj, kune kun Nan Hai, komenci nian duan itineron en alia "parteto" de Ĉinio, nome vizitadon de urboj Nankino, *Zhenjiang*, *Suzhou*, *Zhouzhuang*, *Hangzhou*, por fine atingi *Shanghai*-on, kie aviadilo atendas por reakompani nin hejmen.

Estas tre facile vojaĝi tra Ĉinio, iri al stacidomo kaj aĉeti la biletojn direkte al Nankino, elekti la ĝustan trajnon, je la dezirataj horo kaj tago, kiam ... estas ĉino kiu prizorgas ĉion ĉi! Nia ĉina alparolo estis ankoraŭ tro limigita, mankis vortoj al ni, ni fakte sciis diri nur: Ni hao, wo bu yao, dui bu qi, xie xie, tai gui le... (*Kvizo de Tea-Bulteno: kiu kapablos traduki al esperanto ĉi tiujn vortojn, ricevos belan premion! Promesite de la redaktanto!*) kaj tiuj tute ne sufiĉis por peti informojn ĉe stacidomo! Do, nia Nan Hai solvis ĉiujn niajn prilingvajn problemojn, ne nur kaze de aĉetado de biletoj, sed ankaŭ dum veturadoj per taksio, per busoj, kiam temis

pri mendo de ĉambro en hoteloj, de manĝoj en restoracioj, pri butikumado... Jes, ankaŭ tiuokaze li pretis helpi nin, eĉ kiam ni, trafitaj de tiu bone konata, tipe ina malsano, nomata "freneza aĉetumado", kurigis lin de unu vendejo al alia, de unu bazaro al alia, senhalte kaj senpire! Kaj poste eĉ li ŝarĝis sin per niaj mansaketoj, ĉar ni tro lacis... Nu, li vere meritoplene gajnis tute oran "pokalon de pacienco kaj eltenemo"!

La impona Granda Ponto sur rivero Yangtze, kun longo de 4590 metroj kaj larĝo de ĉ. 20 metroj bonvenigas nin en Nankino, iama imperia ĉefurbo, en provinco Jiangsu. Ĉi tie vivas Nan Hai, kun sia tre gastama familio. La urbo estas relative "malgranda", kompare kun Pekino, ĝi havas "nur" 5 milionojn da enloĝantoj! Ĝin ĉirkaŭas muregoj, altaj 14 metrojn kaj longaj 33 km-ojn, kies brikaro estas surstampita per originalaj ideogramoj, indikantaj la fabrik-ejon, la nomojn de la konstruisto kaj de la laborist-estro kaj foje eĉ la daton. Tiel facilas distingi ilin de tiuj kiujn oni anstataŭis kaze de rompiĝo. Belajn ekskursojn ni faris en la Nankina ĉirkaŭaĵo, sur la Purpura montetaro, en la bela parko, mergitaj en mirinda naturo: kaŝitaj en la verdo monumentaj temploj, la Maŭzoleo de Sun Yatsen, la Patro de la Respubliko, tre amata de la ĉina popolo (por ĝin viziti oni supreniras ŝtuparon el 392 ŝtupoj—ni grimpis kiam temperaturo estis de ĉ. 38 gradoj, pli-malpli!), la tombon de Imperiestro Hon Wu kaj la Vojon de la Spiritoj, ĉe kies flankoj imponas entute 24 grandegaj ŝtonaj statuoj, reprezentantaj mitajn kaj realajn bestojn. Ĉio grandas en ĉi tiu fascina kaj historia loko, kaj vi, vizitanto, etas inter tiuj gigantaj verkoj, iamaj kaj nuntempaj.

Sed, kiel jam dirite, en Ĉinio ĉefis por ni havi kiel eble plej multe da kontaktoj kun la loka esperantistaro: ankaŭ tion ni sukcesis realigi, danke al nia Nan Hai. Varmkore ni estis akceptitaj kaj regalitaj per bongustega, pli ol 20-plada, tagmanĝo en la restoracio de la Nanjina Universitato, fare de Jianhua Cui, vicdirektorino de Aplika Fremdlingva Universitata Departemento kaj prezidantino de la Jiangsu Esperanto-Asocio. Jes, ne miru! Pli ol 20-plada tagmanĝo! Neniam antaŭe io simila okazis al mi! Kvar diverstipaj supoj, riveraj fiŝo kaj salikokoj kun delikataj spicaĵoj, porkaĵo kun papriketoj, boligita ansero kaj rostita kolombo, tofuo kun speciala saŭco, algoj, meduzoj kaj pli kaj pli da aliaj frandaĵoj. Dum la kunveno kun nankinaj samideanoj, mi havis la eblon konatiĝi kun s-ro Song Shengtan, tre konata kaj kompetenta filatelisto, kiu i.a. kompilis la Katalogon de Esperantaj poŝtmarkoj: aparte ĝojiga renkonto por mi!

Dum nia restado en Nankino, ni ekskursis iutage al apuda urbeto *Zhenjiang*, kie bonvenigis nin tuta Esperanto-klaso de geinfanoj, akompanataj de gepatroj kaj de Neĝeta (*Shi Xueqin*), vicprezidantino de *Zhenjiang*-a Asocio. Ŝi instruas Esperanton al deko da ĉarmaj 7-jaraĝuloj, kiuj tiuokaze volonte demonstris al ni siajn parolkapablojn. Temis pri tre gaja kaj vigla kunestado, ritmita per iliaj muzikemaj voĉetoj: ili kun intereso kaj scivolemo starigis tre trafajn demandojn pri niaj vivmanieroj kaj kutimoj, por fine regali nin per belaj infankantoj, dancoj kaj muzikludado. Sed aliaj surprizoj atendis nin: unue, ni estis invitataj por nekredible luksa, "imperiestra" tagmanĝo ĉe restoracio de la urba Hotelo (ĉi-foje mi ne sukcesis kalkuli kiom da delikataĵoj ni tie

gustumis!) kaj due, ekskurseto per motorboato al insulo sur Yangtze-rivero, en kies parko troviĝas antikva Templaro kaj novkonstruita Pagodo de la 10 mil Budhoj. Ripoziga (kaj... digestiga!) estis la promenado en tiu bela, verda naturo. Tre interesa la revenvojo pro la panoramo al la granda rivero, pro la arbaro kiun ni sur padoj trapasis, renkontante jarcentajn arbojn, inter kiuj pino aĝa pli ol 1000 jarojn, pro la surrokaj skribaĵoj, restaĵoj el antikvaj tempoj.

... Kaj tempo pasas, eĉ tre rapide! Baldaŭ ni atingas la lastajn celojn de nia vojaĝo, nome *Suzhou*, *Zhouzhang* kaj *Hangzhou*. "En ĉielo estas la Paradizo, sur la tero estas *Suzhou* kaj *Hangzhou*" diris antikvuloj.

*Suzhou*, la Orienta Venecio, la urbo de silko kaj ĝardenoj: Marko Polo ĝin priskribis kiel "...la urbo de la ses mil ŝtonaj pontoj, sub kiuj eĉ galero povas pasi." Kiam mi estis preskaŭ duone de la vojaĝo, Nan Hai fojfoje min demandis: "Kio ĝis nun plej plaĉis al vi en Ĉinio?" Nu, tute ne facilis respondi, ĉar ĉio estis vidinda, ĉio estis por mi tiel eksterordinara kaj fascina, ke ne eblis objektivite juĝi kaj diri propran opinion, sed post esti vidinta *Suzhou*-urbon, mi ne plu havis dubojn: ĝi estis la **perlo** kiun mi trovis en la ĉinia, perlamota, ostro. La ĝardeno en la ĝardenoj! En ĉi tiu loko la arto kaj filozofio pri ĝardenoj esprimiĝis plejaltgrade. Kiel en muziko notoj sinsekvas, akorde kaj agorde, kaj la rezulto estas senfina harmonio, orela kaj kora, tiel en *Suzhou* la pitoreskaj ĝardenoj estas la apoteozo de ĉiu formo de ĉina klasika arto: pentrado, kaligrafiaĵo, poezio, arkitekturo... Tie akvo simbolas la vivo-spiron kiu unuigas la universon, la rokaĵoj la montojn de senmortuloj; la blankaj muroj, la ombroj, la pordoj kune pentras plej diversajn pejzaĝajn bildojn, la susurado de la vento tra la arba branĉaro aŭ la frapetado de pluvo sur la foliaro elvokas la tempopason en mondo daŭre ŝanĝiĝanta. Ĉio en ĝi kreita ne estas hazardo, ĉio havas sian apartan signifon, kiun la vizitanto mem devas rekonii aŭ malkovri - iom post iom - kiel pentraĵon rulfalditan, kiun oni disvolvas malrapide por ĝui - iom post iom - ties intensan belecon. Tiu ĉi estas mia impresio pri *Suzhou* kaj ĝi restos firme fiksita por ĉiam en mia memorujo.

Kaj kion pri la loka esperantistaro? Ĉu eblas havi dubojn pri ilia gastamo kaj amika akceptemo? Neniam eblos forgesi s-ron Zhou Hong kaj s-inon Wang Xue (jes, tiun esperantistinon kiu interpretis kaj ĉiĉeronis dum la antaŭkongresa ekskurso al Guilin kaj Xi'an). Dank' al ili nia tiea restado estis tute ĝuinda, senproblema kaj feliĉa. Dank' al ili mi eĉ havis la bonŝancon gustumi specialaĵojn kiaj: wantoo kaj ying yu, long xia k.a. (*Dua Kvizo de Tea-Bulteno: kiu kapablos diveni pri kio temas, ricevos belan premion!*).

Sed ni ne povas halti ĉi tie, ni devas viziti ankoraŭ aliajn du urbojn, kaj per aŭtobuso unue al *Zhouzhuang*. Denove oni devas esprimi sincerajn dankojn al nia nelacigebla kaj neniam grumblanta aŭ protestanta akompananto Nan Hai, kiu, ĉiumomente, ĉiukaze, ĉiel, tre zorge kaj atenteme, "vartis" la du italinajn (en PIV, varti signifas: *Gardi k prizorgi estulon, kiu bezonas helpon pro sia juneco, nefortikeco*. Demando: por gardi kaj prizorgi du ne plu junajn estulinojn, ĉu alia pli taŭga termino ekzistas?). Mi ja pensas ankaŭ pri la fakto, kiamaniere komuniki ekzemple kun la biletvendisto ĉe

aŭtobusaj stacioj, al kiu oni devas demandi: je kioma horo forveturas la aŭtobuso al ..., kiom kostas la bileto, kie estas la haltejo de nia aŭtobuso ks. Ni ne havis tiajn kaj aliajn eventuale pli gravajn problemojn, dank' al Esperanto kaj al Nan Hai!

Por vizito de Zhouzhuang, aldoniĝis al nia kutima akompananto alia, tre ĉarma esperantisto, nome s-ro Xueqi Tao, loĝanta en apuda urbo. Kune kun ili, ni vagadis tra tiu antikva vilaĝo, kiu vivis sian oran periodon sub dinastioj Ming kaj Qing. Ĝia plej tipa karakterizaĵo estas la domoj kaj palacoj konstruitaj antaŭ 600 jaroj, unu- aŭ maksimume du-etaĝaj, tre bone konservitaj kaj restaŭritaj. En ĝi ne ekzistas trafiko, la vivo disvolviĝas laŭlonge la kanalojn, sur kiuj arke staras la malnovaj ŝtonaj pontetoj, en la mallarĝaj stratoj, en la sekretaj internaj kortoj de tiuj tipaj domoj kies nigra tegmentaro elvokas la birdajn flugilojn. Miniaturado de antikva Ĉinio, kiu altiras kaj allogas multajn turistojn (... eĉ troajn!). Tre trankvilan tagon ni tie pasigis, kune kun niaj amikoj, kun kiuj certe la rilatoj daŭros en estonteco.

Du horojn ni bezonis por atingi *Hangzhou*-on, kaj dum la veturado niaj pensoj estis iom malgajaj, ĉar vizito de tiu urbo signifis baldaŭan finon de nia vojaĝo: jes, post *Hangzhou*, denove al *Suzhou* kaj de tie, per aŭtobuso, rekte al *Pudong*, la flughaveno de *Shanghai*. *Ni ĝui kiel eble plej intense ĉiujn vidindaĵojn de nia lasta vojaĝo-celo kaj ĉefe la kunestadon kun esperantistaro*—tio estis nia devizo!

Jen la verda urbo, ĉirkaŭata de ondantaj montetoj kaj kuŝanta ĉe la Okcidenta Lago, sur kiu per Drak-boato navigi kaj atingi la centre lokitajn insuletojn, aŭtentikajn oazojn de paco kaj trankvileco; tie la Templo de Anima Izoliĝo, nature harmonianta kun la kvietaj ĉirkaŭaĵoj, en kies haloj majeste imponas aŭ statuo de Majtrejo aŭ de Ŝakjamunio, ĉi lasta skulptita en kamforligno, tute orumita kaj alta 19 metrojn; tute apude la Alfluginta Monteto, el kalka ŝtono, riĉa je grotoj kaj kavaĵoj, sur kiu troveblas pli ol 280 antikvaj budhismaj ŝtonskulptaĵoj datiĝintaj inter la 10<sup>a</sup> kaj 13<sup>a</sup> jc. De la malnova parto de la urbo, malmulto restas, sed tie kaj ĉi tie, ĉefe kie okazas la vespera subĉiela merkato, evidentas ke bonŝance renovigado respektis la anktimecan fizionomion. Ankaŭ en *Hangzhou* bonvenigis nin lokaj gesamideanoj, kun kiuj eblis babilo pri plej diversaj temoj kaj danke al tio ni povis pliriĉiĝi per novaj konoj pri evoluo de nuntempa ĉina Esperanto-movado.

Sed ĉio sur ĉi vivo tera havas sian finon kaj samo okazis al nia Ĉina aventuro. Ĝi daŭris 4 semajnojn, ĝi estis foje tre laciga kaj malfacile eltenebla, ni multon suferis precipe pro altgrada temperaturo kaj troa aermalsekeco, sed entute, se eblus, mi ĉion ĉi emus revivi ankoraŭfoje. Kio plej belis, kion mi plej ŝatis? Mi jam diris, ne facilas respondi al ĉi tiu demando, ĉar ĉio estis superba, ĉio estis admirinda, ĉio fascine mistera kaj ĝuste pro tio tre impresa. En mi certe restos memoraroj pri vizititaj lokoj, pri trafiko haosa, pri bazaroj tre riĉaj, pri imponaj grandioz-dimensiaj urboj, pri superstratoj 12-vicaj, pri nekutima arkitekturo ĉu antikva ĉu moderna... Sed estas io kio neniam forvaporigis aŭ vualigis pro la tempopaso: la malfermita amikiĝemo de ĉiuj ĉinoj, ankaŭ de tiuj neesperantistaj, la ĉiam ridetantaj vizaĝoj, la ĝentileco kaj sincera respekto, la

pacienca eltenemo fronte al io negativa, kaj la entuziasma fervoro al kio oni kredas: ĉion ĉi mi neniam forgesos kaj samtempe esperas, ke el ĉi tiu mia unika sperto mi povos ricevi instruon, kiu utilis al mi laŭlonge mian ceteran vivovojon.

Al miaj malnovaj amikoj, al miaj novaj amikoj,  
al ĉiuj ĉinoj elkoran xie xie kaj zai jian!

## PROGRAMO EN TEA

Preskaŭ ĉiuj jam revenis el siaj feri-lokoj kaj, reakirintaj forton kaj energion post tiel longa ripozo, jam pretas denove eklabori por nia afero. Vendredon la 3<sup>ma</sup> de septembro, unuafoje post la somera paŭzo, ni kunvenis kaj, krom rakonti unu al alia pri la partoprenitaj Kongresoj (triestanoj ĉijare iris al Hispanio, al Hungario, al Ĉinio!), ni interkonsentis pri venontmonataj programoj. Unuavice pri la baldaŭa ekskurso al Arnoldstein (12/09/04) por Festo de Amikeco, **veno al Triesto de nederlanda esperantisto Johano Sepers (14-21/09)** kaj vizito al Marĉelo Trampus fine de oktobro.

La 30<sup>ma</sup> de septembro startos unuagrada kurso. Ĝi okazos ĉiun jaŭdon ekde la 18.30 ĝis la 20<sup>a</sup> horo. Klopodu kiel eble plej vaste propagandi ĝin, inter konatuloj, intersemuloj, nekonatuloj ktp ktp. Oktobre oni daŭrigos la duagradan kurson, vendrede je interkonsentota horaro.

Enprogramitaj estos la, dumardaj, esploradoj en la arkivo por ĉerpi informojn cele al preparo de la Historio de Triesta Esperanto-Asocio, kiu 100-jariĝos en 2006. Ni daŭre ekzercados nin en la arto "interpretado", prepare al la Universala Kongreso okazonta en Florenco. Ne mankos projekciadoj de diapositivaj kaj filmoj pri vizititaj lokoj aŭ kongresoj, prelegoj pri Esperantohistorio kaj pri pioniroj de nia movado. En preparo ankaŭ komunaj skribaj tradukadoj de ital-lingvaj artikoloj al Esperanto aŭ inverse. Do, ne mankos aktiveco, se ne mankos vi, kara asociano! Nur per via konstanta ĉeesto kaj partopreno en niaj programoj, oni povas certigi la pluan vivon kaj progreson de nia asocio!

Ni atendas vin marde kaj vendrede ekde la 19<sup>a</sup> horo!

## 15<sup>a</sup> MKR en Slovenio (23<sup>a</sup>-26<sup>a</sup> de septembro)

La 15<sup>a</sup> MONTKABANA RENKONTIĜO okazos ĉijare en Pliskovica, eta vilaĝo en sudokcidenta Slovenio, kiu troviĝas 20 km-ojn nordokcidente de Sezana kaj nur 3 km-ojn for de la sloven-itala limo! Ĝi situas meze de Primorska regiono, ĉefe konata pro la belaj montoj, tradiciaj vilaĝoj kaj bongustegaj vinoj.

MKR-ejo estos junulargastejo en tradicia kampanara domo, renovigita kaj nun protektita kiel kulturmonumento. La ĉijaraj ekskursoj estos aparte interesaj pro vizito de Kaverno Skocjanske, protektita de UNESCO kiel tutmonda heredaĵo, de la mezepoka vilaĝo Stanjel kaj pro gustumado de loka produktita vino. Pliaj informoj pri la renkontiĝo, la priaj bildoj kaj retaliĝilo troveblas ĉe:

<http://www.angelfire.com/va2/Vanja>

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO

Sidejo: Via Coroneo 15 - 34133 Trieste

tel/fakso: +39 040 763 128

Reto: [esperantotrieste@adriacom.it](mailto:esperantotrieste@adriacom.it); [nored@tele2.it](mailto:nored@tele2.it)

<http://arte.triesteincontra.it/esperanto>

Poŝta adreso: CP 601 - IT-34100 Trieste Centro - Italio  
Poŝtĉekkonto N° 10834349